



BELGA KATOLIKO

Oficiala bolteno de la BELGA KATOLIKA LIGO ESPERANTISTA

(B. K. L. E.)

Nacia Sekcio de la INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

(I. K. U. E.)

JULIO 1911

ENHAVO:

Alvoko al niaj legantoj — Programo de la Dua Katolika Kongreso en Hago — Enkele Ophelderingen - Quelques Explications — Belgaj Katolikoj iru al la Dua Katolika Kongreso en Hago — Kelkaj rapidaj Portretskizoj — Lernu Esperanto — Pri la Tria Belga Esperantista Kongreso en Charleroi — Pri la ĝenerala kunveno de « Belga Katolika Ligo Esperantista » — Novaj libroj — Interesplenaĵ Sciigoj — Anoncoj.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

ĉe LEO HEIDENDAL

A R E N D O N K

NIEUW !

NIEUW !

SPIRITA JUVELARO

Roomsch Katholiek Esperanto Kerkboek

Deze nieuwe uitgave is door twee Zeereerw. Geestelijken geschreven, welke voor dit doel eene mooie verzameling van keurige gebeden volgens de laatste voorschriften van Z. H. Pius X samenstelden tot een handig formaat Gebedenboekje.

Prijs in Linnen bandje fr. 2.10, in Lederen bandje fr. 3.70.

R. K. ESPERANTO-BOEKHANDEL

A. N. GOVERS, — Westeinde 6

DEN HAAG

Vi Legu :

- Espero Katolika
- Nederlanda Katoliko
- l'Espérantiste Catholique
- Germana Katoliko
- Kataluna Katoliko
- Belga Esperantisto

London. — Thos Cook & son Adr. : Ludgate circus.
Turist-vaporsip, kaj eksped-agentoj, K. t. pl.
Filioj tra la tuta mondo.

London. — Inkofabriko Henry Stephens.
Adr. : Aldergate str. London. La belegaj mondkonataj inkoj de Stephens estas multe imitataj, sed neniam egalitaj pri kvalito.

Konataj medicinaj Produktoj

Burroughs Wellcome & Co

LONDONO (Anglujo)

New-York — Montreal — Sydney — Cape Town — Milan,
Shanghai — Buenos-Aires.

Petu belan senpagan ilustratan libreton en Esperanto.

1a Jaro.

Nº 2

JULIO 1911.

BELGA KATOLIKO

ORGANO DE

LA

Belga Katolika Ligo Esperantista
(B. K. L. E.)



NACIA SEKCIO DE LA

Internacia

Katolika Unuigo Esperantista
(I. K. U. E.)

REDAKCIO : Por ĉio koncer-
nas la redakcion (artikoloj —
informoj — broŝuroj — libroj —
k.t.p.) oni sin turnu al :

ADMINISTRACIO : Por ĉio kio
koncernas la administracion (re-
klamoj — monsendoj — anoncoj
— k.t.p.) oni sin turnu al :

Sro Leo Heidendal, ARENDONK.

ALVOKO AL NIAJ LEGANTOJ.

Ni ne forgesu tutkore danki la Bonan Dion kiu helpis nin trovi malavarajn amikojn por ebligi nin eldoni la unuan numeron de « BELGA KATOLIKO ». Ni ankaŭ konstatas plezure ke tiu unua numero estis generale ŝatata. Ne nur de niaj membroj, sed ankaŭ de fremduloj, el diversaj landoj ni ricevis korajn gratulojn. Al ĉiuj amikoj ni respondas : DANKON !

Sed komenci, kvankvam ĝi estas multe, ne estas ĉio, necese estas daŭrigi. « BELGA KATOLIKO » ne estos ĵurnalo sed nur BOLTENO. Ĝi ne aperos je antaŭ fiksitaj datoj, sed nur de tempo al tempo, laŭ bezono. Ĝi estos sendita SENPAGE al niaj membroj tiel longatempe kiel ni havos la sufiĉajn monrimedojn. Ĝis nun estas nur dank' al la malavareco de du aŭ tri amikoj kiuj nepre volas resti anonimaj, ke ni estas povintaj fari tiom da elspezoj. La membroj, kies nombro tamen jam superas la centon, pagas kotizajon nur je 1 franko jare. De tiu kotizaĵo nur 0,75 restas en la kaso de la Ligo. Ni devas sendi 0,25 po membro al la Centra Oficejo de I. K. U. E. en Vincennes, laŭ artikolo IV de nia Regularo. Niaj legantoj do ne miros se ni certigas ke, ĝis nun, la kotizajoj ne tute pagas la ordinarajn elspezojn de la Ligo. Por la Bolteno ni devas fidi en la libera bonvolo de niaj amikoj. Tamen, ni ne povas trouzi la bonecon de du aŭ tri. Ni do

kuraĝas peti al ĉiu kiu povas nin helpi per mono, bonvoli sendi ion al nia Sekretario-Kasisto. Ni dankeme akceptus la plej malgrandan moneron. Kiel Katolikoj ni aldonas, per la lingvo de la Sankta Eklezio « *Bis dat qui cito dat* » tiu donas duoble, kiu donas tuj.

Ne estas necese prui al niaj legantoj ke nia Bolteno estas ne luksa sed necesa. Neniu Societo povas vivi kaj daŭri se iu ligilo ne kunligas la membrojn. Se, bedaŭrinde, ni Belgaj Katolikoj ne povas ofte kunveni korpe, per nia Bolteno, ni povos kunveni spirite kaj anime.

En tiuj ĉi paĝoj ni povas interrilati, ni, la Komitatanoj, ni povos sciigi al la membroj la diversajn faktojn, kunvenojn, kongresojn k. t. p. kiuj prezentos al ili kelkan intereson, sciigi al ili la progreson de nia Katolika movado, ne nur en Belgujo sed ankaŭ en la tuta mondo. Aliparte, niaj membroj, per la Bolteno, povos sciigi al ni siajn dezirojn, proponi rimedojn por plibonigi nian aferon, kaj interrilati, per la Internacia Korespondado, kun aliaj Katolikoj en diversaj kaj tre malproksimaj landoj.

Ni kuraĝas proponi al ili unu rimedon kiu multhelpus nin, t. e. sendi al ni, aŭ havigi al nia Bolteno, pagatajn anoncojn. Kvankvam « BELGA KATOLIKO » ne havas ĝis nun grandan nombron da legantoj, tamen, ĉar ni devas interŝanĝi ĝin kun la aliaj Esperantaj gazetoj, ĝi estos legata en pli ol 40 diversaj landoj. Do, kiel Internacia organo, ĝi estas tre bona

rimedo por anonci komercaĵojn, librojn, hotelojn, libertempajn ejojn k. t. p. Se ni havus sufiĉe da anoncoj ni estus baldaŭ sendependaj, kaj ni ne devus plu trouzi la malavarecon de kelkaj amikoj.

• Pri la eldono de la Bolteno, ni esperas aperigi almenaŭ ankoraŭ unu numeron antaŭ la DUA KATOLIKA KONGRESO en Hago, 14 ĝis 19 Aŭgusto, kaj la SEPA INTERNACIA ESPERANTISTA KONGRESO EN ANVERPEN, Aŭg. 20 ĝis 28. Poste, eble dum Oktobro, ni eldonos gravan kongresan numeron.

Ni finos dirante: helpu nin karaj amikoj, kaj ni promesas fari kiom eble plej por meriti vian malavarecon.

La Redakcio de B. K.

PROGRAMO

DE LA

« DUA KATOLIKA KONGRESO »

en Hago,

Aprobata de Lia Episkopa Moŝto de Haarlem,
Mro. CALLIER.

Estas por ni granda plezuro povi jam prezenti al niaj gelegantoj, la oficialan kaj definitivan programon, de ĉiuj laboraj kunsidoj Rimarku, ke antaŭ ĉiu laborokunsido, oni disdonos al ĉiu ĉeestanto presitan resumon de la temo pridiskutota, kaj samtempe la provon de la deziresprimo prezentota al la voĉdonoj de la kunsido, post la pridiskuto. Tiel, ĉiu povos pli facile sekvi la parolaĵon, kaj decidi se li dezirus peti la parolon por diskuti, ĉu la temon de la oratoro, ĉu la formon de la deziresprimo. Tju lasta estas ŝanĝebla per la voĉdono de la plimulto. La deziresprimoj, esperante kaj latine verkitaj, estos sendotaj al la Sankta Seĝo, kaj al la Episkoparo.

Lundo 14 Aŭgusto, 8 h. vespere:

Malferma kunveno, ankaŭ ĉeestebila por ne-esperantistoj. Parolado de la Nederlanda pastro Prof. G. van Poppel, Weissensee apud Berlin, Paroladoj de la ĉiulandaj dele-

gitoj, legado de telegramoj kaj leteroj k. t. p. Mardo 15 Aŭgusto, 3-5 h.

a. Raporto de la Unua Kongreso en Parizo, *S-ro Claudius Colas*, Paris.

b. Raporto pri la nuna stato de I. K. U. E. *P-ro Duvaux*, Vincennes (Francujo.)

c. Pri la Reunuiĝo de la Kristanaro, *Rev. S-ro E. A. G. Tovey*, (Anglujo.)

d. Starigo de Konstanta Komitato por la Kongresoj. Decido pri la landoj de la du proksimaj kongresoj. *S-ro W. Lutkie Lzn.*, Reijen (Nederlando.)

e. Elekto de Komitato por verki Vortaron de teologiaj radikoj.

(Rimarko: La du lastajn temojn oni prokrastu ĝis unu posta kunveno laŭ disponebla tempospaco.)

8-10 h. Rimedoj por helpi per Esperanto la jam ekzistantajn katolikajn societojn por la protekto de la Virinoj. *B-ino de Ménil*, Paris, kaj *S-ino Milsom*, Genève.

Ĵaŭdo 17 Aŭgusto 10-12 h. Starigo de tutmonda apologia societo por la defendo de la Eklezio, *P-ro Parker*, Wexford (Irlando.)

2-5 h. a. Esperanto kiel rimedo por helpi la Blindulojn. La laboro jam farita, kaj farota, *Frato Isodore*, Bruselo.

b. Rimedoj por helpi, per Esperanto, laboristojn, komercistojn, turistojn, k. t. p., por ke ili trovu Pastrojn kaj katolikajn samideanojn en ĉiu lando *P-ro Poell*, Tilburg (Nederlando.)

Vendredo 18 Aŭg. 10-12 h. La Katolikoj kaj la Pacifismo. *P-ro Richardson*, Bruselo.

8 h. vespere. Fermo de la Kongreso.

La Kongres-estraro:

P-ro A. Richardson, Prezidanto.
S-ro W. Lutkie Lzn. } Vic.-prezidantoj.
S-ro F. Steijffers }
S-ro Claudius Colas } Sekretarioj.
S-ro J. N. J. Smulders }
S-ino L. Whitney-Hekking } kasistinoj.
F-ino M. Borrel }

Enkele Ophelderingen.

I. — Christenen uit verschillende landen zien de noodzakelijkheid in weder te keeren tot het middenpunt der EENHEID door Christus zelf ingesteld.

Verschillende Niet-Katholieken zullen dit feit komen staven, er zullen verslagen voorgelezen worden die duidelijk de uitgebreidheid dezer beweging naar de Katholiciteit zullen aantoonen, zoowel in 't Oosten als in 't Noorden.

II. — Uiteenzetting van bewijzen, om aan te toonen dat de Nederlandsche hulptaal « Esperanto, » (door hare vertegenwoordigers de gansche wereld door verspreid), veel kan bijdragen, om de reeds bestaande maatschappijen of inrichtingen van Geloofsverdediging te helpen in het verdedigen der H. Kerk en harer Dienaren tegen de aanvallen der vijandelijke pers.

III. — Het verschil der talen is soms een groote hinderpaal bij de briefwisseling welke de strijd tegen den « witten slavinnen-handel » vereischt.

Mevrouw Barones de Menil zal de bespreking van dit onderwerp openen.

IV. — Voor de blinden heeft het Esperanto reeds veel gedaan. De Eerw. Broeder Izidoor, de Apostel der Blinden, zal ons doen kennen wat er reeds op 't Kongres van Napels (1910) gedaan werd, evenals op 't Kongres van Kairo (1911), waar wenschen geuit werden voor het invoeren van Esperanto-leergangen. Hij zal ons daarna toonen wat er nog te doen blijft.

V. — Reizende Esperantisten vinden overal « Samideanoj », dus betaamt het ook dat katholieken « Samreligianoj » vinden, en vooral priesters bij wie zij kunnen aankloppen om te biechten, of om andere nuttige raadgevingen te bekomen.

VI. — Het Kongres zal plaats

Quelques Explications.

I. — Des chrétiens de divers pays, quoique séparés du Saint-Siège, commencent à voir la nécessité de retourner à ce centre de l'unité, établi par le Christ lui-même.

Plusieurs A catholiques viendront exposer ce fait pendant le Congrès, et des rapports seront lus, montrant l'étendue du mouvement vers le Catholicisme, dans l'Orient et dans l'Occident.

II. — On démontrera que la Langue Internationale l'Espéranto, étant répandue partout, et ayant ses délégués dans tous les pays du monde, peut beaucoup aider toutes les Sociétés déjà existantes, établies, pour défendre l'Eglise et ses ministres contre les calomnies de la mauvaise presse.

III. — La différence des langues est souvent un grand obstacle à la correspondance que nécessite la guerre contre l'infâme traite des blanches.

C'est Madame la Baronne de Menil qui ouvrira la discussion à ce sujet.

IV. — L'Espéranto a déjà fait beaucoup pour les Aveugles. Le Rév. Frère Isidore, l'Apôtre des Aveugles, montrera ce qui s'est déjà fait au Congrès de Naples (1910), et à celui du Caire (1911), où des vœux en faveur de l'enseignement de l'Espéranto ont été formulés. Il montrera ensuite ce qui reste à faire.

V. — Les Espérantistes qui voyagent trouvent partout des « samideanoj », mais il importe que les catholiques trouvent aussi des coréligionnaires, et surtout des prêtres auxquels ils peuvent s'adresser pour la confession et pour tous conseils utiles.

VI. — Le Congrès aura lieu à La Haye, la ville des Congrès de la Paix, et le siège du Tribunal de l'Arbitrage. Il est de toute nécessité que les

vinden in Den Haag, de stad van 't Vrede-Kongres, Zetel der Rechtbank van Scheidsrechtelijke beslissingen. Het is dus volstrekt noodig dat de Katholieken de standvastige leering der Kerk in 't voordeel van den Vrede onder de oogen der vredestryders aller landen brengen; en dit vooral nu, dat sommige beweringen, zonder bewijsredenen, de Kerk van Jezus-Christus voorstellen als gunstig voor den Oorlog.

BELGAJ KATOLIKOJ IRU AL LA DUA KATOLIKA KONGRESO EN HAGO.

Ni esperas ke la Belgoj ĉeestos multnombre en Hago. London la 14an de Aŭgusto okazos la malferma kunveno. Ĝi estos certe grandioza propaganda manifestado, ke oni ne manku ĉeesti. Ĝi okazos en la granda Festsalono de la Instituto Sta. Vincentius. La programo kiun ni ĉi-supre presigas, montras al niaj gelegantoj kiel interesaj kaj praktikaj estas la temoj traktotaj.

Plue, ekskurso al la belega « RESIDENTIE » de Nederlando, unu el la plej ĉarmaj urboj de Eŭropo, estas por ni, Belgoj, tre facila, kaj tre malkara vojaĝeto. La agema kaj tutpraktika organiza Komitato ĉion faris, por faciligi kaj agrablighi al la Kongresanoj ilian restadon en Hago. Por havigi ĉiujn detalojn, ĉu pri la Kongreso, ĉu pri la prezo de loĝejoj k.t.p., sin turni tuj, sen prokrasto, al unu el la du Kasistinoj: F-ino Borret, Prins-Hendrikstraat, kaj S-ino Whitney-Hekking, Weimarstraat, 251, Den Haag. Tial ke la elspezoj de la Organiza Komitato estas grandaj, oni petas la kongresantojn jam mendi kaj *PAGI* siajn kongreskartojn: la prezo de la kongreskarto estas 5 frankoj (2 Sm.)

Fine, estus nepre dezirinda veturi de Belgujo al Hago *karavane*. Ni do proponas al la Belgoj kiuj intencas ĉeesti la Hagan Kongreson, sendi iliajn nomojn al Abato Richardson, 121, Rue du Marais, Bruselo. Se sufiĉe da personoj konsentus veturi karavane, li estas preta aranĝi la foriron de Bruselo, kaj de Antverpeno, la 14an de Aŭgusto matene, por alveni en Hago sufiĉe

catholiques puissent placer devant les yeux des Pacifistes de tous les pays la doctrine constante de l'Eglise en faveur de la paix; surtout en présence de certaines assertions sans fondement, que l'Eglise de Jésus-Christ serait favorable à la Guerre.

frue post-tagmeze. Tiamaniere, oni povus tagmangi en Hago kaj post iom da ripozo, ĉeesti la malferman kunvenon je la 8a vespere. Sed por tio estus nepre necesa ke Abato Richardson havu la liston de la Kongresantoj antaŭ la 25an de Julio. Post tiu dato, li ne plu povus sin okupi pri la Karavano.

Kelkaj rapidaj Portretskizoj.

De Prezidantoj.

Honori Virantojn.

I.

Pastro Richardson

Ekzistas homoj kiuj efektive tro multe spertis de l'vivo.

Ili ne plu trakomprenas la idealojn de l'junularo, kaj iliaj koroj ne plu vivas la junecan plenesperan vivon.

Ĉu la vivo estas kulpa? Ne, ilia maltorteco estas kulpa. La idealoj, la entuziasmo de ilia juneco ne estis sufiĉe fortaj nek altaj por elporti la malkontentigaĵojn de l'vivo. Kaj iom post iom ili malvarmiĝis, malkuraĝiĝis, kaj nun ili estas vivspertuloj kiuj avertas, ĉiam manente haltigilon.

Mi ne prijuĝas ilian agadon, ĝin nur konstatas.

Despli mia koro ĝojiĝas renkontante maloftan homon kies animforteco estadis tiel granda, ke ĉiuj plejakraj malkontentigaĵoj de lia fortmova vivo ne povis venki lian amovarmen kaj optimismon.

Tia homo estas nia maljuna Unuiĝoprezidanto, nia alloga kondukanto, nia tre

amata patro spirita, pastro Austin Richardson.

Austin Francis Richardson naskiĝis apud Bombay en Brit-Indujo la 21an de Oktobro 1843a.

Pro la dolorega morto de sia juna edzo, kiu estis armekuracisto, lia patrino baldaŭ poste reiris Anglujon kun siaj du geinfanoj.

La religio de lia juneco estis tiu de l'Anglikana « High Church » sed, je la aĝo de 21 jaroj Dio mirigmaniere konigis al li la veran religion, kaj post multaj kompreneble malfacilaĵoj li katolikiĝis, kaj pastrigiĝis, estinte seminariamiko de l'nuna kardinalo Mercier.

Pro deca diskreteco mi ne povas tie ĉi pli detale rakonti la tre interesajn kaj vere mirigajn cirkonstancojn. La tempo ne ankoraŭ venis por honorigi Dion per senrezerva sciigo de l'ĉefaj faktoj el la fruktoriĉa vivo de Lia grandsimpla servisto.

Mi nur volas memori ke li pasigis parton el sia vivo en Anglujo kaj parton en Belgujo, kaj spertis la nepriskribeblian ĝojon konduki ĉirkaŭe 200 animojn al nia Eklezio. Ducent! Ĉu li ne estas vera apostolo? Kia alttitolulo havus pli da merito ol ĉi-tiu simpla pastro?

Sed ni donos titolon al li.

Pastro de amo li estas,

Li estas grandeca pro sia amo. Amo (karitato) estas la temo pri kiu parolante li neniam laciĝas. Amo brilas el liaj okuloj kiam li predikas antaŭ ni en preĝejo aŭ en kunvenejo: ĉar lia parolo estas ĉiam kvazaŭ sanktiga prediko.

Pro amo tremas lia mano kiam li benas nin per la Sankta Eŭharistio, — plejvole je la nomo de nia sankta Patro Pio Xa, — nin kaj nian laboron.

Amo vibras tra lia voĉo eĉ kiam li plendas pri nenoblaj atakoj kontraŭ nia movado, plendante ne pro si mem sed nur pro la savo de nia movado.

Eĉ kiam li koleras, ĝi estas nur pro amo.

Estas la amo kiu direktas kaj gvidas liajn pensojn, estas la amo kiu instigas liajn agojn, estas la amo kiu regas tutan vivon lian.

Li estas korpe malsana nun. — Pro ni kaj pro nia movado ni preĝu por akirilian tutan resanigon. Por ke li presidu « nian Duan, » denove plenretortiginta.

II.

Pastro Lamb. J. J. M. Poell.

Naskiĝis en 's Hertogenbosch 1871. Hodiaŭ vikario en Tilburg. Sociala agado estas lia ĉefa okupado.

Nia Nederlanda Ligoprezidanto ŝajnas kontraŭaĵo de nia Internacia Unuiĝoprezidanto.

Li estas tiele rasnederlandano ke eĉ ni nomas lin flegmatikulo: Kiam li iĝas pro ia nobla afero tre entuziasma, tiam li direktas: « hm, » — kelkafoje eĉ li eldiras: « jes »... Sed kiam li volas iun celon, li ankaŭ volas la rimedojn por ĝin atingi, je kiu ajn prezo.

Ho, ne fidu en la ŝajno! — Certe li havas la amon kvankam oni kelkafoje povus bedaŭri ke la ŝajno mankas al li preskaŭ tute. Li havas la viran amon fortan kaj nevenkeblan. Multe kaj akrege kalumniita, li tamen daŭrigas senkondiĉe tutan vivon sian doni al la afero katoliksociata. Ĉu tio estus ebla, se ne per la karitato?

Viro forta li estas, sed forta precipe per memdeteno: — Foje li estis en kunveno kie oni el ĉiuj flankoj atakis lin. Pluvis riproĉoj, insultoj, malamaĵoj. — Li sidis tute trankvila, kvazaŭ ĉio ne koncernas lin sed lian najbaron. Ĉis kiam li opiniis ke la ludo sufiĉas kaj devas finiĝi. Li elpoŝigas sian poŝhorloĝon, rigardas ĝin, diras kviete: « estas tempo por mia vagonaro ekforironta, » leviĝas, premas laŭvice la manon al ĉiuj ĉeestantoj (estis malgranda rondo) kaj ekeliras trankvilege, je ne priskribebbla miro de ĉiuj.

Multaj kontraŭopinias lin pri diversspecaj aferoj. Sed ĉi-tiun rimarkon mi ĉiam referadas je mia vera ĝojo: ne eĉ unu honorinda persono kiu konas lin, faras riproĉon al lia intima kaj religia vivo. Male. Je ĉi tiu punkto oni ĉiam honoras kaj laŭdas lin — Mi ofte aŭdis, eĉ legis; Poell estas malprava, Poell agas riproĉinde, nebone, danĝerige, — sed kian ajn

riproĉon mi povas fari al li, mi devas atesti, ke li estas ekzempla piulo kaj pastro

Kaj ankaŭ ni volas pro tio respektive laŭdi lin; ĉar ni *scias*, eĉ kvankam aliaj neus aŭ malkonfesus ĝin.

Kun tiaj cirkonstancoj lia penegado ne estos senfrukta.

Li vivas, laboras ĉiam meze de vera ĥaoso. Mi ofte vizitas lin, kvankam mi apenaŭ povas trovi lokon por sidiĝi en lia ĉambro. Je unu el miaj vizitoj mi ekparolis pri Esperanto. Estis en 1909a kaj mi mem nur ekkomencis la studadon kaj propagandon. Mi donis kelkajn klarigojn. Demandis lian opinion kaj helpon « Hm », li diris, « kompreneble ni devas utiligi tion kio montriĝas praktika rimedo por niaj kontraŭuloj. »

Sed bedaŭrinde li estas tro okupatega. Kaj jam li diris al mi, ke li forlasos nian ligan kiel prezidanto. Ne pro manko da simpatio, sed pro manko da tempo. Tamen, li ne decidis tion antaŭ « Nia Dua. » Kaj poste... li certe ne povos.

W. LUTKIE Lzn.

Aprilo 1911a Reijen — Nederlando.

LERNU ESPERANTO

Ni nepre scias ke inter niaj cent gemembroj, kelkaj ne ankoraŭ scias nian karan kaj belan lingvon. Ili aliĝis nian Katolikan Ligon, tial ke ili simpatias kun nia sankta

celo: labori, penadi por Kristo kaj por Lia Eklezio, per la Internacia lingvo Esperanto. Sed tiu simpatio, ĝis nun, ne naskigis la decidon *lerni Esperanto*. Permesu al ni diri al tiaj geamikoj, ke ni tute ne kontentiĝos ĝis kiam ili iĝos, ne nur samideanoj, sed ankaŭ samlingvanoj.

Ni bone komprenas la kialon de ilia hezito. Ili pensas ke Esperanto similas aliajn lingvojn, kaj certe postulos unu aŭ du jarojn da studado. Ni ne nur certigas al ili ke ĉiu povas tre bone lerni Esperanton post unu au du monatoj, sed ni prezentas al ili la rimedon praktike *pruvi* la veron de nia diraĵo. Dank' al la malavareco de amiko, ni povas sendi *donuce* al ĉiu membro de B. K. L. E. unu el la plej bonaj kaj plej praktikaj el la Esperantistaj lerno libroj, « Esperanto » — « l'Esperanto pour tous » de Sro. A. J. Witterijck, Vic-Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista. Baldaŭ ni sendos al ĉiu membro — eble jam kun la dua numero de nia bolteno — tiun bonegan lernolibreton, aŭ flandre aŭ france verkitan. Ke ĉiu kiu ne ankoraŭ scias nian lingvon elstudu ĝin almenaŭ dum duono da horo ĉiutage, kaj ni certigas ke antaŭ la eldono de nia tria numero, ĉiuj gelegantoj tre bone komprenos niajn artikolojn, kaj komencos korespondi kun fremdaj katolikaj gesamideanoj. Ni aldonas ke por havigi tiun utilan libreton, ili povas ĉiam sin turni al Sro. Witterijck, Bruĝo. La prezo estas nur 0,10 po N^o aŭ 6 frankoj po cent numeroj.

Daŭrigo de la membra listo.

- Abato Moulaert, Curé-doyen, Dixmude.
 S^{ro} Vangheluwe, Profesoro, (Universitato) Leuven.
 Abato IJserbijt, Kanunnik, Pastoor der Hoofdkerk, Brugge.
 S^{ro} H. Tanghe, Leeraar, Brugge.
 Eerw. Zuster Xaveria, Overste, Wulverghem.
 Eerw. Zuster Augustina, Algemeene Overste, Nieuw-Kerke.
 S^{ro} Vandendriessche, Ingénieur, Kortrijk.
 S^{ro} Leo Decoene-Hautekeete, Kortrijk.
 S^{ro} M. Millicam, Kortrijk.
 F^{ino} C. Decoene, Meenen.
 F^{ino} C. Hanssens, Brugge.

- F^{ino} R. Decoene, Kortrijk.
 F^{ino} M. Delpierre, Kortrijk.
 F^{ino} M. Wicart, Reckem.
 S^{ino} A. Decoene-Hautekeete, Kortrijk.
 S^{ro} R. Wicart, Reckem.
 S^{ro} J. Meulemans, Reckem.
 S^{ro} Van Overstraeten, Sint-Truiden.
 S^{ro} A. Degeneffe, Sint-Truiden.
 S^{ro} Van den Dijck, Maastricht.
 F^{ino} M. Cornet, Charleroi.
 F^{ino} E. Van den Bergh, Charleroi.
 S^{ro} Parotte, Verviers.
 S^{ino} Parotte, Verviers.
 F^{ino} R. Wuijts, Antwerpen.
 S^{ro} Barbe de Kneef, Gentbrugge.
 S^{ro} J. Goris, studento, Arendonk.
 Patro Valentinus Stappers, Sint-Truiden.
 S^{ro} J. Mievis, Sint-Truiden.
 R^{do} S^{ro} Kanoniko Senden, Sint-Truiden.
 S^{ro} L. Minon, Boschvoorde.
 S^{ro} J. Ruttiens, Brussel.
 Patro Van de Veer, Sint-Truiden.
 Patro G. Vervaet, Sint-Truiden.
 Patro Drieghe, Sint-Truiden.
 S^{ro} Vanderheijden, Sint-Truiden.
 S^{ino} Lagneau, Brussel.
 S^{ro} Van de Putte, Kortrijk.
 S^{ro} Philippens, Charleroi.
 S^{ino} Philippens, Charleroi.
 S^{ro} Malget, Charleroi.
 S^{ro} Schaltin, Liège.
 S^{ro} V. Boel, Brussel.

Pri la Tria Belga Esperantista Kongreso en Charleroi.

Tiu kongreso estis tre sukcesa. Tial ke ni esperas ke ĉiu Belga Esperantisto legas nian nacian Organon « BELGA ESPERANTISTO », ni ne intencas doni raporton pri la festoj de la « Tria ». Ni devas tamen plezure konstati ke en Belgujo same kiel en aliaj landoj, ĉiu kongreso komencas per Diservo.

En Charleroi la meso por la kongresanoj okazis en la bela kapeleto nomata france « Notre Dame des Remparts ». Abato Austin Richardson la prezidanto de la I. K. U. E. oferis la Sanktan Meson, kaj post la Evangelio mallonge predikis Espe-

rante pri la teksto « Emitte spiritum tuum et creabuntur et renovabis faciem terræ » « Elspiru vian Spiriton kaj ili kreigos kaj vi renovigos la tutan teron. »

Pri la ĝenerala kunveno de « Belga Katolika Ligo Esperantista. »

Pro la malfacila dato, la lundo de la Pentekosto, kiam multaj geamikoj partoprenis en la postkongresa Ekskurso al Thuin, kaj multaj aliaj festis la belan libertempon kun siaj familioj, nur 4 personoj kunvenis al la rendezuo ĉe le Moulin d'Or, 30, d'Assaut-strato, Bruselo. Pro tio oni estis devigata prokrasti la ĝeneralan kunvenon ĝis la SEPA Kongreso en Ant-

verpeno. Tie estos facile trovi unu liberan horon dum kiu ni esperas ke multaj gekatolikoj kunvenos en oportuna loko. Pri tiu kunveno ni esperas paroli pli longe en la proksima Bolteno.

NOVAJ LIBROJ.

« *Methodus excipiendi confessiones ordinarias variis in linguis.* Auctore: P. J. C. Van der Loos, Dioceseos Haarlemensis Sacerdote. Ĉe C. N. Teurlings, 's Hertogenbosch, Nederland, Prezo 2 frankoj. »

Mi alvokas la atenton de ĉiu membro de la Katolika Pastraro en ĉiu lando jen bele presita, kaj bone bindita volumo, facile portebla en la poŝo, kiu tamen enhavas metodon per kio Pastro povus preni la ordinaran konfesion de la pentantoj el 11 diversaj landanoj, eĉ ne komprenante ĉiun el tiuj lingvoj. La verkisto tre ŝage aldonas sekcion en ESPERANTO, kio estos mire utila al multaj misiistoj. Ni povus citi okazojn kiam la pastroj kaj la fideluloj egale nesciis ESPERANTON. Fine oni decidis ambaŭe elstudi ĝin per « Ĉefeĉaj » Ŝlosiloj, kaj post kelkaj tagoj, Pastro kaj

pentanto povis interrilati per nia mirinda Helplingvo. La metodo estas simpla kaj praktika. Por ĉiu lingvo oni donas 66 paraĝrafojn, ĉiam la samajn, latine kaj fremdlingve, fine latine kaj Esperante. Jen la diversaj lingvoj uzataj, kun la latina teksto ripetata ĉiuloje: Angla, Nederlanda, Germana, Franca, Itala, Hispana, Dana, Pola, Bohemia, Slava kaj Esperanta.

« *De Esperantische woorden volgens de beteekenis vereenigd* ». H. Van den Kerckhove, membro de la Brusela Grupo « *La Zamenhof* ». Brugge, A. J. Witterijck, *Nieuwe Wandelring*, 4. »

Ni varmege rekomendas tiun utiligan libreton al ĉiuj niaj Nederlandaj kaj Flandraj gesamideanoj. Plue, ni aldonos, ke ĝi estus utiliga al ĉiu Esperantisto, kiu deziras lerni, aŭ sin perfektigi, pri la Nederlanda lingvo. Ni devas nur rimarki ke ĝi estas eldonita de la konata firmo de Witterijck, la Vic-Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, tio sufiĉas por certigi ke la presajo, la papero kaj la bindo igas tiun beletan lernolibron je 47 paĝoj, inda trovi sian lokon en ĉiu Esperantista librejo. Ni vere miras pri la eta prezo: 0,75 centimoj.

INTERESPLENAJ SCIIGOJ

Abato Richardson, Prezidanto de I. K. U. E., ricevis afablan inviton de Lia Dekana Moŝto la Kanoniko CLEIJNHENS, por ke ni venu Antverpenon por aranĝi kun la Ekleziaj aŭtoritatoj de la Metropolo, pri la Diservoj dum la Sepa Esperantista Kongreso Internacia. Ni sciigos la rezultaton al niaj gelegantoj en nia proksima numero de la Bolteno.

La sama Prezidanto de I. K. U. E., ricevis oficialan leteron de S-ro. D-ro. BOIRAC, Rektoro de la Dyon'a Universitato, kaj prezidanto de la Esperantista Akademio, petante lin proponi al la Dua Katolika Kongreso la starigon de Komitato de katolikaj kleruloj, por verki vortaron de teologiaj radikoj, proponotan al la aprobo de la Akademio.

En Dresdono, dank' al la nelaceblaj klopodoj de S-ro. B. T. ULM, al kiu la Katolikoj tiom ŝuldis dum la « kvara » en Dresdono (1908), nova Katolika Grupo sub la nomo « Fideleco » fondigis je la 13a de Junio. La Grupo estas plena aprobata de Lia Episkopa Moŝto Mrg. SCHAEFER, kaj aliĝas al I. K. U. E. La grupo kunvenas ĉiun mardon, 4, Kauffer-strato. La Prezidanto estas S-ro R. WENKE, 46, bis. SCHAEFERSTRASSE, Dresdono. Aliajn detalojn ni donos en la proksima numero de la Bolteno.

Monata ĵurnalo enhavanta artikolojn en Esperanto kaj en diversaj lingvoj. Organo por la interŝanĝo de poŝtmarkoj, kaj korespondado per ĉiuj lingvoj, la Abono = frkj. 2,50 jare. (1 Sm.) Oni sin turnu al la Redakcio: Avenue du Moulin, 16, Forest-Bruxelles.

PROPONOJ POR INTERKORESPONDADO.

Oni petas la korespondantojn jam cititajn, kiuj ne plu deziras korespondi, tion sciigi al la Redakcio kiel eble plej baldaŭ.

La grupo de Basel, Svisujo. Adreso: S-ro Rusterholz. Prezidanto 22, Marschalkenstrasse. F-ino Maud Sewell, Whitehall Cottage. Bishops Stortford, Anglujo.
S-ro Wallace Mackay, 22, Coniston Avenue. Newcastle-on-Tyne. Anglujo.
S-ro T. Tchacarevitch. Lycée Imp' Ottoman, Uskul, Turkujo.
S-ro G. N. Appleton, Lynchburg. Va. United States N. America.

Rekomendindaj Firmoj

Sinjoro Leo DE COENE-HAUTEKEETE, Rue Savary, Courtrai.
Fadenoj — Stupoj — Kotonoj spinataj k. t. pl. — Oni parolas Esperanton.

Notariejo de Sinjoro BOSSAERT, Courtrai.

Pension-Lernejo por Fraŭlinoj. « Les Dames de Saint-Nicolas » Courtrai kaj Dixmude. Oni petu prospekton al la Respektinda Superulino.

Strumpaĵoj: ESPERANTISTOJ, aĉetu ĉiam ĉe la bonkonata firmo Soj. MATHIEUX kaj Filoj: 49, Marché aux Poulets, BRUSELO. Delegito por Belgujo de U. E. A.

Sinjoro VERHAUT, Presisto en Courtrai.

LIBREJOJ Esperantistaj

A. J. Witteryck, Presisto-Eldonisto, Brugge.
Spineux & C^o Rue du Bois Sauvage, Bruxelles.
Belga Esperanta Oficejo, Vondelstraat, 20, Antwerpen.
Franca Esperanta Oficejo, Rue d'Angoulême, 20. Paris.
A. N. Govers, Westeinde, 6, Den Haag.

HOTELOJ

COURTRAI: « Hôtel du Nord » Je la stacidomo, Kunvenejo por Esperantistoj.

Au Moulin d'or, Rue d'Assaut, Bruxelles. Esperanta Kunvenejo.
Hôtel Louis Le Grand 2, Rue Louis le Grand, Paris. En belega loko, apud avenue de l'opéra.

Hôtel Métropole, Brussel.

La plejgranda hotelo en Belgujo, 500 ĉambroj kaj 150 ĉambraroj kun banejoj.

Oni parolas Esperante.

LONDONO: Tre rekomendinda kaj komforta, vere « ESPERANTA-HEJMO ». Sinjorino O' Connor « Esperante House », 17, St. Stephens Square. Bayswater, London, W. Tre moderaj prezoj.

INKOFABRIKEJO

HENRY STEPHENS

Aldergate str. LONDON

Kvankvam multe imitataj la belegaj
mondkonataj inkoj de Stephens
estas neniam egalitaj pri kvalito

EKSPED-AGENTEJO

THOS COOK & SON.

LUDGATE CIRCUS

LONDON

Filioj tra la tuta mondo